

## KUNVOKILO al Eksterordinara Membrokunsido, la 28an de marto 2021, je la 14a ĝis la 16a, rete kaj telefone.

La Komitato de la Kulturdomo de Esperanto deziras **prunte preni 120 000 €** kun interezo de 1% post franca imposto (1,43% antaŭ imposto), repagota dum kvin ĝis dek jaroj ekde la 31a de decembro 2024, por fini la renovigon de la tegmento de la kastelo. Ĉar tiu ĉi decido devigos je repago la estontajn estrarojn de la Societo, gravas ke ĝin aprobu Eksterordinara Membrokunsido. Tiu ĉi okazos dimanĉon la 28an de marto 2021 inter la 14a kaj la 16a, rete (sen surloka ĉeesto en Greziljono) pere de la ligilo:

<https://zoom.us/j/95377611190?pwd=TjNuaWJKZGJoOXIHNGJsYlUvVFZmOT09>

kaj telefone, el Francio ĉe la telefonnumero: **01 7037 2246** (el aliaj landoj, vidu: <https://zoom.us/zoomconference>), tajpante la identigilon de la kunsido: **953 7761 1190** (pasvorto: tegmento).

La decido rezultos el reta voĉdono (per la retejo [balotilo.org](http://balotilo.org)) okazonta antaŭ kaj dum la kunsido mem. La societanoj, kiuj ne povos partopreni, aŭ kiuj ne povos aŭ ne volos voĉdoni pere de la retejo [balotilo.org](http://balotilo.org) bonvolu sendi siajn ĉi-subajn voĉdonilojn perpoŝte al:

**François LO JACOMO, 72 quai de la Loire, 75019 Paris,**

skribante "Voĉdono" sur la koverton, aŭ retpoŝte al:

**[tegmento@gresillon.org](mailto:tegmento@gresillon.org)**.

Via papera voĉdonilo estos enkalkulita nur se vi ne voĉdonis ankaŭ pere de [balotilo.org](http://balotilo.org).

Se la Membrokunsido aprobos principe la pruntadon, la Komitato rajtos konsideri la rimarkojn faritajn antaŭ aŭ dum la Membrokunsido por finredakti la modelan pruntokontrakton. Ĉiu pruntanto ricevos sian propran pruntokontrakton kaj rajtos elekti la daŭron de la pruntado, inter kvin kaj dek jaroj.

### Tagordo

- 1) elekto de prezidanto kaj protokolanto de la kunsido,
- 2) diskuto pri la prunto-projekto kaj la koncernaj konstrulaboroj,
- 3) nombrado de la balotiloj. La kvorumo (42 "ĉeestantaj aŭ reprezentataj societanoj") estos kalkulita laŭ la nombro de balotintoj.

### Unua rezolucio

La Membrokunsido permesas al la Komitato prunte preni 120 000 € repagotajn ĝis la 31a de decembro 2033, por fini la renovigon de la kastelo Greziljono ĝis 2023.

### Dua rezolucio

La Membrokunsido permesas al la Komitato redakti la definitivan version de la prunto-dokumentoj surbaze de la ĉi-kunaj dokumentoj, post konsidero de la eventualaj rimarkoj farotaj antaŭ aŭ dum la Membrokunsido, sen postulo de plia voĉdono por ĉiu eventuala tia amendo..

## VOĈDONILO

Unua rezolucio (permesi la pruntadon):

POR

KONTRAŬ

SENDECIDE

Dua rezolucio (permesi amendojn):

POR

KONTRAŬ

SENDECIDE